



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

Administracio kaj Redakelo: Str. RODA, n.º 14-16

EL "KIHOTO"

ĈAPITRO UNUA

(Daŭrigo)

Fine, tutperdinte la prudenton li trafis en la plej strangan penson, kiu venis en kapon de frenezulo, nome, ke li kredas konvene kaj necese tiel por plialtiĝo de lia bonfamo, kiel por la servado al lia lando, fariĝi vagira kavaliro kaj traŭradi la tutan mondon serĉante la aventurojn kaj praktikante ĉien, kion la vagiraj kavaliroj ekzercadas, kiel li estis leginta, malfarante ĉiuspecajn ofendojn kaj sin elmetante al okazoj kaj danĝeroj, per kies sukcesa eltiriĝo li akiris eternan gloron kaj famon. La kompatindulo sin imagis jam kronita, almenaŭ kiel imperiestro en Trapisonda pro la kuraĝeco de sia brako: tiel delogite de ĉi tiuj agrablaj pensoj kaj de la stranga ravo kiun ili al li sentigis, li rapidis efektiviĝi lian deziron. Lia unua faro estis purigi iajn armilojn, apartenintajn al liaj praaĵoj, kaj kiuj rustiĝintaj kaj ŝimplenaj jam de post longaj centjaroj restadis en domangulo forgesitaj. Ilin li purigis kaj pretigis kiel eble plej bone, sed li trovis en ili grandan difekton, tio estas, ke anstataŭ plena kapŝirmilo ili nur havas simplan morionon: al tio tamen helpis lia lerteco, ĉar el kartonoj li konstruis kvazaŭ kaban duonŝirmilon, kiu, premenmetita en la morionon, faris laŭ ŝajno plenan kapŝirmilon. Estas vero, ke celante provi, ĉu ĝi estas fortika kaj povas sendifekte ricevi tranĉbaton, li eltiris sian glavon, frapis sur ĝin dufoje kaj per la unua bato tuj malfaris, kion li estis konstruinta dum semajno, sed li ne trovis malbona la malpenon dispecigi la ŝirmilon, kaj por forigi tiun danĝeron li ree faris la kapŝirmilon, almetante internajn fervergetojn, tiamaniere, ke li kontentiĝis pri ĝia fortikeco kaj sen deziro fari novan provon, li akceptis kaj kredis ĝin perfektega plenŝirmilo. Tuj poste li iris vidi sian ĉevalaĉon kaj spite, ke ĝi havas difektitajn hufojn kaj pli da malbonaĵoj ol la ĉevalo de Gornelo, kiu *tantum pellis et ossa fuit*, ŝajnis al li, ke ĝi superas la Bucefalon de Aleksandro kaj la Babieka'n el Cid. Kvar tagoj preterpasis dum li elpen-

sas kian nomon li donos al sia ĉevalaĉo, ĉar (kiel li diris al si mem) ne estis prave, ke la ĉevalo de tiel fama kavaliro, kaj tiel taŭga per si nem restu sen konita nomo. Tial li penis alkonformigi al ĝi nomon tiamaniere ke ĝi deklaru, kia ĝi estis antaŭ ol aparteni al iu vagira kavaliro kaj kia ĝi nun estas. Estis ja tre prave ke, ĉar ĝia mastro ŝanĝis sian vivmanieron, ĝi ankaŭ aliĝu per la nomo, ricevante alian faman kaj tropompecan, kiel de cas al la nova klaso kaj al la nova ekzercado jam de ĝi plenumata; tiel post projekto de multaj nomoj, kiujn li elformis, elpensis, forviŝis, apartigis, aldonis, malfaris kaj refaris en sia memoro kaj imago, li fine trafis ĝin nomi Rocinanto, nomo, laŭ lia opinio, alta, belsona kaj signifanta tion, kion ĝi antaŭe estis kaj nun ankoraŭ estas, la antaŭa kaj unua ĉevalaĉo el ĉiuj mondaj ĉevalaĉoj*. Nominte ja tiel siaplaĉe sian ĉevalon, li volis doni al si nomon kaj en tia pripensado li pasigis ok tagojn ĝis li fine trafis sin nomi *don Kihoto*, pro kio, kiel jam dirite, la aŭtoroj de tiu ĉi plenera historio trovis okazon certigi, ke li sendube nomigas Kihada kaj ne Kesada, kiel aliaj pretendis. Sed rememorante, ke la brava Amadis ne kontentiĝis sin nomi Amadis simple, sed li aldonis la nomon de sia reĝlando kaj patrujo por ĝin glorigi kaj jen nomiĝis Amadis de Galujo, same li mem volis, kiel bona kavaliro, aldoni al sia nomo tiun de sia patrujo kaj sin nomi don Kihoto de la Manĉo, per kio, laŭ sia opinio, li tre efike elmontris sian familian devenon kaj patrolandon kaj honoris ĉi tiun prenante ĝian almonon.

Puriginte, do, siajn armilonjn, farinte el moriono plenan kapŝirmilon, doninte nomon al sia ĉevalaĉo kaj konfirminte sin mem, li ekkomprenis, ke nur mankas al li serĉi nobelinon en kiun enamiĝi, ĉar vagira kavaliro sen amatino, estas arbo senflora kaj senfrukta kaj korpo sen animo. Li diradis al si: "Se pro mia malbona aŭ bona sorto mi ie renkontas iun giganton, kiel kutime okazas al la vagiraj kavaliroj, kaj mi lin renversas

(*) Hispane *Rocinante*, vorto konsistanta el *rocin* (ĉevalaĉo) kaj *ante* (antaŭe) kaj signifanta: antaŭe ĉevalaĉo.

per la unua ektuŝego aŭ lin mezokorpe trafendas aŭ fine mi lin venkas kaj subkuŝigas, ĉu ne taŭgos havi iun al kiu lin sendi por prezentiĝo tiel, ke li aliru kaj surgenuiĝante antaŭ mia milda amatino diru al ŝi per humila kaj peta voĉo: Mi estas, Sinjorino, la giganto Karakuljambro, regnestro de la insulo Malindranja, kiun venkis en senegala duopbatalo la neniam sufiĉe inde laŭdita don Kihoto de la Manĉo, kiu ordonis, ke mi prezentiĝu antaŭ via Moŝto, por ke via Grandsinjoreco disponu pri mi laŭplaĉe?" Ho, kiel ĝojis nia bona kavaliro, farinte tiun ĉi alparolon kaj plie, kiam li trovis, kiun nomi lia amatino!

Tio estis, laŭ oni kredas, juna kamparino, tre belŝajna kaj loĝanta en proksima vilaĝeto, kiun li iam enamiĝis kvankam, kompreneble, ŝi neniam ĝin eksciis, nek komprenis. Ŝi estis nomita Aldonza Lorenzo kaj al li ŝajnis taŭge titoli ŝin mastriĉo de liaj pensoj. Kaj serĉante al ŝi nomon, ne tre malkonforman al la sia, kaj imitantan kaj celantan rangon de princino kaj almoŝto Sinjorino, li fine ŝin nomis Dulcineo de Toboso, ĉar ŝi estis Tobosanino, nomo ŝajnanta al li belsona, rava, kaj signifa, kiel ĉiuj ceteraj, kiujn al si kaj al siaj aĵoj li estis difninta.

El hispana lingvo tradukis,

VICENTE INGLADA.

KREPUSKO

EL A. LACAUSSE

Jen purpurvespero, jen la plej trankvila taghoru
La suno laciĝas kaj lasas sen plua kuraĝo
Palpebron lazuran sur sian pupilon el oro,
En mezo de l' maro, tedite de brila vojaĝo.

Krepuskaj violoj semiĝas tra l' kampo aera
Griziĝas la fundo de l' montoj en tiu momento.
L' arbara ĉasisto kaj la fiŝkaptisto rivera,
Ŝarĝite, nekure revenas al pajla tegmento.

Sur la ebenaĵoj flirtadas bluetaj vaporoj,
La mil kaj mil bruoj de l' tago perdiĝas sur tero
Abeloj, birdetoj, falenoj kaj muŝoj sur floroj
Aŭ en arbitaĵoj ekdorma en muta vespero.

Per nokta venteto la floroj la roson ricevas:
La branĉojn ekklinas jam la frostsentema mimozo
La noktkonvolvulo la freŝajn urnetojn relevas,
Sur kiuj falenoj sidadas por fina ripozo.

Plantistsonorilo vibradas tra l' vastaj savanoj,
Anoncas ĝis maro la nokton l' akrega sonoro.
En fundo de vojo profunda, en la sukerkanoj,
Nigruloj kaj bovoj revenas de l' pluga laboro.

El sojlo, simila al la patriarkoj bibliaj,
La mastro rigardas la bandojn venantajn kun
[zumo.

Li tiam alvokas la nomojn kaj baldaŭ en liaj
Bienoj reĝadas silento, ripozo, mallumo.

El franca lingvo tradukis,

GUSTAVE PHILIPPET.

ĤEKSTERLANDAJ PAĜOJ

LA SANKTA ELIZABETO

LEGENDO PRI "WARTBURG"

Kiu iam estis en la bela lando Turingujo, konas la malproksimen en la landon saluntantan Wartburg-on. Sed ne ĉiu konas la originon de ĉi tiu kastelo kaj la legendojn, kiuj rakontas pri ili. Antaŭ multaj, multaj jaroj grafo "Ludoviko, la saltanto" venis dum la ĉasado al ĉi tiu roka monto, kiu situas ĉe la rivereto "Hörsel" apud "NiederEisenach". Li rigardis la belan ĉirkaŭejon kaj diris al si mem: "Wart' (atentu) monto, vi devos esti kastelo por mi!". Sed ĉar la monto, apartenis al la posedaĵo de sinjoro de Frankenstein, li elpensis ruzaĵon kaj konferencis kun dekdu el siaj nobelaj kavaliroj, kiel li povus havigi al si la monton por konstrui sur ĝi kastelon. De el "Schäuenburg", kiu estis lia posedaĵo, li igis porti sekrete dum nokte sablon en korboj sur la Wartburgon kaj konstruis ĉi tie sian kastelon. Kiam la laŭ leĝa posedanto nun jure plendis kontraŭ Ludoviko antaŭ imperiestro kaj regno, Ludoviko kun siaj dekdu kavaliroj provis juri per la glavo sur la suprenportita tero, ke li estis konstruinta sur la propra tero. El la legendaro, kiu en la paso de l' tempo estiĝis pri Wartburg, estas la plej konataj la kantistkonkuro en la tempo de landgrafo Hermano de Turingujo, kaj la historio de l' virta filo Ludoviko kaj ties pia edzino Elizabeto. Ĉe la kortego de landgrafo Hermano de Turingujo okazis la kantistkonkuro inter la ses kantistoj Henriko de Ofterdingen, Waltero de la "Vogelweide", Henriko, la skribisto, Rejnharo de Zwetzen, nomata ankaŭ Rimisto de Zweter, Wolframo de Eschembach kaj Bitterolf. Ili verkis versojn kaj elpensis novajn melodiojn por ĉi tiuj. Ili laŭdis en siaj kantoj religiajn kaj mondaĵn aferojn kaj kantis laŭdojn pri la princoj, precipe pri sia gastiganto, landgrafo de Turingujo. Nur Henriko de Ofterdingen laŭte laŭdis la dukon de Aŭstrujo. Tial ekflamis la malpaco, kiu fariĝis tiel forta, ke la aliaj kvin kantistoj postulis la mortigon al la Ofterdingenano por la ekzekutisto. Jam ili volis kapti lin, kiam li forkuris al la piedoj de landgrafino Zofio, kiu ŝirme metis sian faltmantelon sur lin kaj savis lin. Rikardo Wagner faris ĉi tiun legendon kernpunkto de sia opero "Tannhäuser", ĉar Tannhäuser estas neniu alia ol Henriko la Ofterdinger, sed Wagner interŝanĝis la personon de la landgrafino Zofio kun ties bofilino, la pia Elizabeto, kiu laŭ la legendo estis forpelata el domo kaj korto, post kiam ŝia edzo Ludoviko falis en la milito Pri Ludoviko kaj Elizabeto la legendo estas plena de mirakloj.

Malgraŭ tio, ke Elizabeto forte amis sian edzon, ŝi neniam forgesis sian piecon, kaj volonte la landgrafo permesis, ke ŝi preĝadis kaj ankaŭ flegis malriĉulojn kaj malsanulojn. Sed ankaŭ malbonaj homoj ne mankis, kiuj plendis pri Elizabeto antaŭ la landgrafo. Kiam Ludoviko iam estis malproksima pro negocioj, Elizabeto flegis maljunan eremiton el la arbaro kaj prenis lin al si sur Wartburg, kvankam ŝia bopatrino, la landgrafino Zofio moketis pri tio. Ŝi ne lasis erarigi sin, puri-

gis la maljunulon, igis bani lin kaj eĉ kuŝigi lin en sian liton. En la sama tago la landgrafo revenis, kaj lia patrino salutis lin per la vortoj: "Leprulo kuŝas en via lito, gardu vin, por ke vi ne venenu vin":

Kolere la landgrafo fortiris la kovrilon de la lito, sed nenion alian ol krucumita Kristo bildon li trovis en ĝi. Alian fojon—granda malsatmizero regis en la lando—Ludoviko surprizis sian edzinon kaj unu el ŝiaj servistinoj, kiuj kaŝis sub siaj manteloj korbajn plenajn de viando, pano kaj ovojn, por porti ilin al la malriĉuloj. Oni estis plendinta pri Elizabeto al la landgrafo, ke ŝi ĉion fordonacas kaj malŝparas. Kiam li nun postulis de ambaŭ virinoj, montri al li, kion ili portas, Elizabeto ektimis tiel, ke ŝi ne povis paroli. Sed en la korboj la landgrafo trovis nenion krom la plej belaj rozoj. Kaj kiam li rigardis sian karan Elizabeton, li rimarkis je sia surprizo aŭreolon super ŝia kapo. De nun li lasis ŝin iri ne malhelpite kaj fari, kion ŝi volis. Ĉiutage ŝi nutris tricent malriĉulojn.

Dum vizito al Wartburg ankoraŭ estas montrataj la ĉambro de la landgrafo kaj la kemenato de la sankta Elizabeto, same la kantistĉambrego, en kiu belega murpentraĵo, regenerita de Schwind, prezentas la kantistkonkuron. Ankaŭ ne forgesata estu la ĉambro de Luther, kiu estas montrata je la rememoro al la pia viro, kiu ĉi tie laboris kaj skribis sian: "Forta kastelo estas nia Dio".

La germana lingvo tradukis,

E. SCHUTT.

Berlin.

AL LINGVO-KREANTOJ

Kolero tremigas miajn nervojn, sed la pensoj alvenas ordiganta. Poste la pensoj tremas pro la sama kialo kvankam ĉi nova kolero estas kvieta, ripoza, paca, senkoler... kial ĉio?

Ĉar nove mi legas propagandilon pri *nova lingvo internacia*, adresitan al mi.

Mi tre ŝatas la novaĵojn, ĉar mi estas juna kaj nova, spirite kaj korpe. Miaj laŭdoj estas preskaŭ ĉiam por la kreema instinkto pro tio ke la kreemo estas la semotero de la vivo. Sen novaj homoj la Homaro maljuniĝus kaj pereus. Sen novaj ideoj la Scienco maljuniĝus ankaŭ kaj mortus pro malnoveco. Ho ve! Kreemo! Suno de l'antaŭeniĝo!... Vojo al kapablo!... Estanto de la tuta estonto.

Jes, mi estas preta ĉiam kanti poemon al homa kreemo. Sed mi malmultajn fojojn estas fanatika amanto de miaj konvinkoj, fermante la okulojn al rezonado. Mi malamegas tutkore kaj tute kreadi malutilajn aĵojn, aĵojn aperantajn tro malfirue, kiel estas novaj lingvoj internaciaj. Ĉar la apero de tiuj lingvoj estas malbona por la Homaro petanta interkomprenilon, ĉar pravigas la Babel-turan rakonto-historion, ĉar ŝtelas la fidon al tiuj kiuj revas pri lingvo internacia, konante ankoraŭ neniun, je la atendo ke la internaciistoj montru unu solan kaj veran internacian lingvon.

La kaŭzoj de mia kolero estas multaj. Unu el ili la atakoj de tiuj lingvo-kreantoj al Esperanto dirante ke ĝi estas malbela, neesprima aŭ malfacila (netaŭgecon ili ne povas mencii ĉar tiu mensogo ne eblus eliri tra la plej *granda* buŝo). Mi respon-

dis al tiuj ke Cervantes estus verkinta "Don Kihoto'n" per iu ajn lingvo; tio estas, ke por verki tiun faman verkon ne estas necese koni funde la Kastilan lingvon, sed esti Cervantes: la verkan-to beligas la lingvon, sed ne la lingvo la verkan-ton.

Finfine, lingvo-kreantoj. Mi kredas vin erarintaj homoj (nepardonindaj se vi envias la zamenhofan famon, kompatindaj se vi celadas la internacian feliĉon). Mi invitas vin pensi konsiderante ke dum la ĉielo estas okupata de multaj astroj nokto kaj mallumo regas. Kiam nur la suno estas la tero trovigas luma, varma, hela, kovrita je floroj, ridanta je birdoj...

Kaj Esperanto estas suno potenca kompare al planedaj sekvuloj, kiel estas la ceteraj lingvoj internaciaj.

AVELINO SEVILLA.

Zaragoza.

GRIZA BILDO

Jus sonis trumpo de iu banko. La maljuna horloĝa sonorilo de iu turo, malrapide kaj malgaje, anoncas la tagmezon. Estas la horo kiam la humiluloj, kiuj ankoraŭ havas iom, disponas la mallongan tagmanĝon.

Proksime de la turo estas ĝardenoj kaj pulva korso, kiu cirkaŭas la urbon; ankaŭ estas mallalta domo, brika kaj apogita en ĝiaj muroj, je ambaŭ flankoj de pordo, du vicoj; unu konsistas el virinoj, en la alia estas mur viroj, la virinoj preskaŭ ĉiuj estas maljunaj, purigitaj kelkaj, malpuraj aliaj, sed ĉiuj malriĉe vestataj; ankaŭ estas iu junulino nigrevestita; kunportas ĉe siaj manoj pajlajn ujojn kaj parolas, sed ne akrasone. Inter la viroj estas de ĉiuj aĝoj; oni vidas maljunulojn apogitajn sur bastonoj, estas mezaĝaj viroj kaj junaj knaboj, eble pli junaj ol ili ŝajnas... La vestoj de ili estus ridindaj, se ni povus ridi pri mizero. Kelkaj vestas jakojn larĝajn kaj tro uzatajn, aliaj montras sub la pantalonoj parton el siaj kruroj nudja la ŝuojn grandajn, kurbatajn aŭ preskaŭ ne utilajn. Malmutaj surportas vestojn faritajn por ili. Ili apenaŭ parolas, kelkaj fumas sed ne volupteme, fumas meĥanike; rigardas la plankon same kiel se iliaj kapoj estus tro pezaj dum iliaj manoj, dikaj kaj kalaj, pendas el la brakoj kiel la rustajhavaj iloj pro la ne uzado. Kelkaj kumportas malgrandajn pakajojn, multaj eĉ ne tion.

Falis mallonga somera pluvo, kiu malsekis la pulvon de la korso kaj lavis la proksimajn arbojn; la suno lumigas kelkefoje tiujn ĉi arbojn ĵus lavitajn sendante al ili smeraldan brilon. Ĉe la vicoj ĉio estas griza, maldiafana.

Aperas en la pordo de la malalta brika domo dika viro, bonmiena, sen kravato; li parolas kun la gardistoj, kiuj imponas ordon ĉe la mizeruloj se estas necese.

La vicoj moviĝas kvazaŭ mitologia rampbesto kaj la geviroj, difektataj de la vivo kaj de la povuloj, antaŭiras malrapide en la pordon de la domo plata kaj sen reliefo, same al ĉiuj "Bonfaremaj Domoj", montrante alvolvitajn paperojn aŭ donante ilin al la dika viro, kiu staras ĉe la pordo rigardante la permesilojn. Eniras malgajaj kvazaŭ petante esti naskiĝintaj, multaj en-

iras rezignacie, eble pensas ke ĉiam estis riĉuloj kaj malriĉuloj... Kvazaŭ estus vero ke nepre tio ĉiam daŭrigos same kaj ke sufiĉan bonon faras la troriĉuloj donante kelkajn erojn el siaj superfluaĵo al la malsatuloj!

KVARTALOJ.

PENSOJ

La plej bona fortikaĵo, la plej firma kaj la sola nevenkebla, estas tiu, kiu konsistas el la koroj de homoj, ne en alteco de muregoj, nek en profundeco de ĉirkaŭfosajoj.

CADAHARSO.

Virin' forgesanta, ankoraŭ estimas,
Vir', kiam pardonas, li ja malestimas.

CAMPOAMOR.

Virino estas pli, ol anĝelo, ĉar ŝi estas patrino.

CASTELAR.

La patrino amo estas la plej pura kaj altnobla el ĉiuj amoj.

CATALINA.

Ignoreco estas ĉevalaĉo, kiu igas ĉiupaŝe faleti sian rajdanton kaj igas mokridinda sian kondukant.

CERVANTES.

Por elkopii vulgaraĵojn farojn kaj ilin montri ridindaj la poeto devas pensi kiel saĝulo kaj paroli kiel popolamasano.

RAMON DE LA CRUZ.

Dio, kiu el kurba linio faris la mondan sistemon, kiu en tiu linion enfermis la sekreton de vivo, kiu metis ĝin en la spacon por elmontri al ni la senfinecon kaj en la cerbon por naskigi la pensadon kaj en la paradizan serpenton por ebligi la homan resaviĝon, metis ankaŭ ĝin en la virinon por ĉirkaŭfermi per simbolo korpa la konsoligan ideon pri la persistemo de nia speco.

CURROS ENRIQUEZ.

Kiam viro multe malamas, li iom ankoraŭ amas.

S-rino DESHOULLERS.

La virinoj estas belaj kiel la seraĵoj de Klopstock, sed teruraj, kiel la demonoj de Milton.

DIDEROT.

Hontemo estas koloreco de virto.

DIOGENO.

Kolektis kaj tradukis,

VICENTE INGLADA.

Disdonado de Esperantaj Libroj

Aldono de disdonotaj libroj: En Okcidento nenio nova; Fine mi komprenas Radion.

Ni rememoras al ĉiuj fratecinoj, ke jam ni disvendis numerojn, kies kosto estas 0'25 pto.

SCIIGOJ

Ĉe la ejo de la Esperantista Grupo Valencia, malfermis kursojn pri Esperanto: D-ro Ernesto Tudela, kuracisto; S-ro Ferdinando Boscá; ĉe la Universitato S-ro Manuel Caplliure. D-ro Daniel Llorens, kuracisto, klarigas ĉiumerkrede, kurseton per Radio kaj li baldaŭ komencos alian por subhirurgiistoj ĉe la Hospitalo. F-ino Elinjo

Páhn klarigas kurson ĉe la Laborista Grupo kaj baldaŭ komencos alian en Requena. Ankaŭ, oni klarigas esperantajn kursojn en Cheste, Gandía, Alcacer kaj Carcagente.

Multfoje ni jam gratulis la valencianojn pro ilia entuziasma esperanta agado; ni scias pri aliaj gravegaj entreprenoj, kiujn nune ili aranĝas. Ni tutkore kaj sincere gratulas ilin kaj ni deziras la plenan sukceson, kiun meritas ilia kuraĝo.

* * *

En Valencio la Radio Stacio malfermis esperantan kurson, kies gvidanto estas D-ro Daniel Llorens Sastre. Ĝi komencis la 7.^a de tiu ĉi monato; prezentis al tiu S-ro nia karega amiko S-ro Piñó; la klarigadon oni daŭrigos ĉiun merkredon je la 22'5 horo. Ni gratulas ĉiujn; Radio Stacio, S-ro Andrés Piñó, D-ro Llorens Sastre kaj Grupo Valencia.

* * *

Ni ricevis belajn esperantajn glumarkojn eldonitajn de Germana Esperanto Ligo en Ĉeĥoslovakio. Tie, oni disvendis 100 ekzemplerojn po 3 internaciaj respondkuponoj.

* * *

A. E. L. A. aperigis libron titolitan "Fine mi komprenas la Radion" originale verkita de E. Aisberg. Ĝi estas verko interesege por kiu volos scii pri tiu moderna scienco: ĝi estas verkita kiel babiladoj, kiuj okazas inter kompetenta inĝeniero kaj lia nevo. Ĝi estas tiel klare verkita, ke ĉiuj legantoj, eĉ tiuj kiuj scias preskaŭ nenion pri elektro, tute bone komprenas ĝin. Estas, ankaŭ, tre amuza la legado de la babiladoj okazintaj inter onklo kaj nevo; tiu klarigas per ideoj kaj parolturnoj infanecaj kaj spritaj, ĉar la verko estas por infano kaj la klarajn kaj spritajn vortojn atingas pli bone la infana menso.

Ni ankaŭ volas paroli pri la bildoj de S-ro Guillac; tiu ĉi s-ro legis la verkon kaj faris margdesegnojn kaj tiamaniere alkonformigis ilin al la ideoj de la verkisto, ke ni ne scias ĉu la verkisto faris babiladojn kaj desegnojn, ĉu la desegnistoj faris desegnojn kaj babiladojn. Ni ĝuis multege leginte la verkon kaj ankaŭ vidinte la bildojn. Ni kredas tiun ĉi verkon tre leginda kaj rekomendinda ne nur kiel scienca verko sed ankaŭ kiel sprita kaj amuza libro; la verkisto, ni povas diri tion, kreas klarigmanieron por ke tiu ĉi fakscienco ne nur apartenu al sciencisto sed al ĉiuj, kiuj sciu preskaŭ nenion pri elektra scienco.

Ĉu ni devas gratuli la verkiston? Ĉu ni devas gratuli nin mem? Ni opinias, ke ni devas gratuli nin mem... kaj ankaŭ ni varme gratulas verkiston, desegniston kaj al A. E. L. A. eldoniston.

* * *

Nia kara amiko entuziasma samideano S-ro Antonio Marmol el Villanueva de las Minas (Sevilla) suferas grava malfeliĉaĵo pro la morto de sia edzino.

Al S-ro Marmol kaj liaj gefiloj ni esprimas nian koran kondolencon.

* * *

Fraterco malfermos esperantajn kursojn, kiuj komencos la 15^a de aprilo.